

# SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

November 1947

35 årg. Nr 11

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

## SVEDUJO

### invitas vin al la 33a!



La statuo de la sveda reĝo Karlo X Gustavo, simbolo de la kongresurbo.

La unua kongreso post la milito ĉijare okazis en Bern, Svisujo. La rompita kontakto inter la gesamdeanoj estas restarigita. La unueco de la neŭtrala esperantomovado estas fakto. La venonta kongreso estos preta labori pri multaj, gravaj demandoj.

Svedujo gastigos la kongresanaron en 1948 kaj decidis okazigi la kongreson en Malmö, unu el la plej sudaj urboj.

En la kadro de la eblecoj ni organizos kongreson, kiu espereble donos tre riĉan rezulton. Ni celas al bonaj diskutoj kaj fruktodonaj decidoj por nia movado kaj bona, amika, verdkora kunestado. Krom tio ni esperas pri riĉaj eblecoj havi interrilatojn kaj interkonsentojn pri estonta kunlaboro inter landaj kaj fakaj organizoj

BONVENON  
AL  
MALMÖ

EN  
1948



kaj individuoj. La ĉefaj punktoj de la kongreso estu la laborkunsidoj, al kiuj ni koncentrigos la plej grandan energion, kaj al la diversaj fakkunsidoj ni provos doni la plej indan kadron.

La sukceso de la 33-a ne nur dependas de iu loka komitato. Plej multe ĝi dependas de la kongresanoj mem, kiuj kunportu energion, entuziasmon, intereson, kunlaboremion kaj ideojn.

La sveda esperantomovado scias, ke la valutaj cirkonstancoj estas kaj dum ankoraŭ longa tempo estos ege malhelpaj al rilatoj inter diversaj landoj. Pro tio la nomita federacio elektis urbon en la plej suda provinco, urbon, kiu estas sufiĉe proksima al la plej granda parto de la eŭropa kontinento. Se vi feliĉe sukcesos havigi pli da sveda mono ol por la kongresaj elspezoj, vi povas veturi norden, kaj nia tuta, bela Svedujo bonvenigos vin de Skanio sude ĝis Laponio norde.

Ni esperas pri rezultoriĉa kongreso en Malmö.

Kaj ni diras al ĉiuj:


**Koran Bonvenon al Malmö en 1948!**

Loka Kongresa Komitato.

# MALMÖ

sin prezentas.

La Granda Placo de Malmö kun la urbodomo, la turo de la preĝejo de S:ta Petro kaj la statuo de Karlo X Gustavo.




Malmö —

- estas la tria urbo de Svedujo kaj la ĉefurbo de la provinco Skåne (Skanio).
- havas ĉ. 170.000 loĝantojn.
- situas sur la skania ebenaĵo en provinco, riĉa je kulturaj memoraĵoj. Ĉirkaŭ la urbo troviĝas tre proksime multaj urboj kaj urbetoj, facile atingeblaj de Malmö per vagonaro, aŭto aŭ biciklo.
- estas malnova urbo, fondita en la 1300-aj jaroj. Ĝi estas sveda urbo de post la jaro 1659, kiam la reĝo Karlo X Gustavo regis en Svedujo.
- posedas malnovan kastelon "Malmöhus", konstruita en 1434. En la paso de la jaroj ĝi fariĝis fama malliberejo, kaj inter la plej konataj malliberuloj estas Bothwell, la edzo de Maria Stuart.

- Nuntempe la kastelo estas parto de la moderna muzeo de Malmö.
- konservas la tre malnovan preĝejon de S:ta Petro. La preĝeja orgeno estas la plej granda de tuta Skandinavio.
- ĝojas pri la malnova urbodomo ĉe la Granda Placo. En la urbodomo troviĝas i. a. la pompa salonego de Knut kaj la pentraĵo "Magnus Stenbock en Malmö" de Cederström, la fama sveda pentristo.
- havas ĉirkaŭ la plej malnova urboparto kanalon, kiu estas restaĵo de la mezepoka bastionurbo.
- situas ĉe la markolo Öresund rekte kontraŭ Kopenhago, la ĉefurbo de Danujo.
- estas en vigla kontakto kun la dana ĉefurbo pere de pramo, ŝipo (en 105 minutoj) kaj flugmaŝino (en 15 minutoj).


Modernaj urbopartoj en Malmö.




Supre: Novaj kvartaloj — "Ribershus" — laŭlonge de la marbordo. En la domoj estas tre modernaj loĝejoj.

Malsupre: Eksperimenta urboparto — "La liberaera urbo" — kun tute novkonstruitaj domoj.

- prezentas al la enloĝantoj kaj vizitantoj multajn bonajn lokojn de banado.
- havas grandan, artefaritan havenon, eĉ sendoganan havenon, kaj la trafiko estas tre vigla.
- havas flugstacion — "Bulltofta" — kun fluglinioj al multaj eŭropaj ĉefurboj. Ĉe la aviadejo estas eble fari rondveturojn super la urbo.
- konservis multajn, interesajn domojn de la mezepoko. La plej konata estas la domo de Jörgen Kock.
- estas urbo de komerco, ŝipirado kaj industrio. Multaj industriaj entreprenoj ekzistas en la urbo. La plej granda estas la ŝipkonstruejo kaj maŝinlaborejo de Kockum. Krome menciindaj estas la cementfabrikejo de Limhamn, granda lanfabrikejo, la konata kalkulmaŝinfabrikejo "Addo", ŝtrump- kaj ĉokoladfabrikejoj.
- aranĝas ĉiujare la konatan Skanian Foiiron, kiun partoprenas la plimulto de la svedaj industrioj kaj komercejoj. La foiro okazas en la fino de julio-komenco de aŭgusto.
- havas tre grandan fervojstacion. Bildo aliloke.



La nova, moderna urba teatro de Malmö. Konstruita en 1944.



La centra stacidomo de Malmö kun multaj fervojlinioj al i. a. Stockholm kaj Göteborg.

- fieras pri la nova, tre moderna urba teatro, kiu vekis admiron en la tuta mondo. Bildo supre.
- posedas tre idilian amuzejon — "La Popola Parko" — kiu somere altiras multajn homojn.
- estas cetere tipa sveda urbo kiam temas pri ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rilatoj.
- havas multajn grandajn kaj tre belajn parkojn, inter kiuj estas menciindaj la Reĝa Parko, La Kastela Parko kaj La Balta Parko, la lastenomita kun la Margareto-paviliono kiel memoraĵo i. a. de la Balta ekspozicio en Malmö en 1914.
- posedas multajn "ĝarden-urbojn", en kiuj ĉiu familio disponas sian propran domon kun bela ĝardeneto.
- fieras pri siaj "someraj urboj", kiuj situas eĉ en la urbo mem, kaj kie iu familio posedas sian propran, someran restadejon — dometon — meze de floroj kaj herbaĵoj. Tamen la urbo kreskas, kaj la "someraj urboj" iom post iom malaperas.

## ELTRANĈEBLA ALIĜILO

Kongresa  
numero: .

### ALIĜILO

**Skribu klare kaj legeble!**

Mi aliĝas al la 33-a Universala Kongreso de Esperanto 1948 en Malmö, kaj samtempe mi sendas pagon laŭ informo dorsflanke.

Familia nomo (1) S-ro, S-ino, F-ino .....

Personaj antaŭnomoj (1) .....

Profesio (2) .....

Nacieco (2)

Strato kaj n-ro (1) .....

Urbo (poŝta adreso) (1) .....

Ev. provinco (1) .....

Lando (2)

Nomo de edzo, edzino aŭ familiano, kiu samtempe (pere de apartaj aliĝiloj) aliĝas al la kongreso .....

Naskiĝa jaro (por junul(in)o) .....

Vegetarano (jes aŭ ne) .....

Mi deziras ĉambron (nur por hotelĉambroj kaj ĉambroj ĉe privatuloj)  
kun unu lito  
kun du litoj (kune kun )

- (1) En nacia lingvo.  
(2) En Esperanto.

**Turnu!**

# UNUA INFORMILO

**Loka Kongresa Komitato.** Prezidanto: Jan Strönne, 1-a vicprezidanto: Oscar Runerheim, 2-a vicprezidanto: Helge Andrén, Ĝenerala sekr.: O. T. Nicolaisen, 1-a sekr.: Ester Andrén, 2-a sekr.: Gösta Henriksson, 1-a kasisto: Alve Persson, 2-a kasisto: Harry Nilsson.

**Aliaj LKK-anoj:** Olle Anderberg, Ernst Andersson, Hjalmar Andersson, Hans Christofferson, Sixten Clausson, John Ek, Clary Hansson, Hilbert Hansson, Gust. Lidbjer, Lennart Magnusson, Erik Olsson, Nils Persson, Sture Persson, Ester Wallin, Hildur Wallin.

**Programa sekcio:** Jan Strönne, Wilhelm Johansson, Eric Fredin, Harry Adler.

**Pres- kaj propaganda sekcio:** Jan Strönne, Rud. Demuth, Frans Rasmusson, Harry Nilsson.

**Loĝiga sekcio:** Jan Strönne, Olof Glemminger, Reinhold Hansson, Gösta Henriksson, Harry Nilsson.

**Financa sekcio:** Jan Strönne, Alve Persson, Harry Nilsson.

**Adreso por leteroj:** 33-a Universala Kongreso de Esperanto, Malmö, Svedujo.

**La kongresa oficejo:** Kamrergatan 3, Malmö.

**Malferma solenaĵo:** Urba Teatro.

**Kongresejo:** Gimnazia lernejo por knabinoj.

**Kongreskotizoj:**

	Ĝis 31/12 1947	Ĝis 31/3 1948	Poste
Kongresano .....	sv. kr. 20	25	30
Edzoaŭedzinodekongresano	sv. kr. 10	15	20
Junul (in)o, ne pli ol 20-jara	sv. kr. 8	10	15

**Pagoj:** Estas akceptataj

- ĉiuj pagiloj, ŝanĝeblaj en bankoj. Atentu: Ne sendu monbiletojn en leteroj!
- internaciaj poŝtmandatoj, ĉekoj ktp pageblaj al la Universala Kongreso de Esperanto, Malmö.
- pagoj al la sveda poŝtĉeka konto 24 60 18 (nur por svedoj).
- pagoj al A.B. Svenska Handelsbanken, Malmö, Svedujo, konte de la Universala Kongreso de Esperanto, Malmö.

— Prefere vi pagu al iu banko petante ke la monsumo estu sendota al A.B. Svenska Handelsbanken, Malmö, konte de la Universala Kongreso de Esperanto, Malmö, kaj kun sciigo pri la sendinto.

— Kiel pago por la kongreskotizo ni akceptas nek poŝtmarkojn nek internaciajn respondkuponojn, kaj nek iajn varojn.

**Aliĝiloj:** Haveblaj ĉe la Kongresa oficejo kaj ĉe la landaj asocioj. Aliĝilo validas nur kun samtempa pago.

**Kongreskarto:** Tuj post la ricevo de la aliĝilo kaj kotizo LKK sendos kongreskarton kaj necesajn sciigojn al la kongresano.

**Al informpetoj** bonvolu aldoni internacian respondkuponon.

**Glumarkoj:** Mendu kaj uzu kongresajn glumarkojn. Por sved. kr. 0.30 aŭ unu internacia respondkupono vi ricevas 15 glumarkojn.

**Kiom valoras unu sveda krono en via landa valuto?** Demandu pri tio en la plej proksima banko aŭ vojaĝoficejo.

**Donacoj** helpas sukcesigi la kongreson, la LKK antaŭdankas al donacoj.

**Blinduloj.** Konforme al la Kongresregularo de UEA blindulo kaj lia gvidanto ricevos senpagan kongres-

Aliĝo validas nur kun samtempa pago!

Al Universala Kongreso de Esperanto, Malmö, mi sendas per

Kongres-kotizo ..... sved. kr.

Por edzo (edzino) ..... " "

Por junulo (junulino) ..... " "

Donaco al la kongresa kaso ..... " "

Donaco al la blindula kaso ..... " "

Por kongresaj glumarkoj ..... " "

Por loĝejo laŭ kategorio n-ro .....

por ..... noktoj po ..... kr. " "

Por ekskurso n-ro E 1 ..... " "

E 2 ..... " "

E 3 ..... " "

E 4 ..... " "

E 5 ..... " "

E 6 ..... " "

Por postkongresaj aranĝoj ktp.: ..... " "

..... " "

..... " "

Entute sved kr.

Deziroj: .....

Kongresa  
Numero:

194 .....

.....  
subskribo

karton ĝis la fino de marto 1948; poste ili devos pagi kongreskotizon po sved. kr. 5:—. La aliĝilo de blindulo devas esti subskribita de blindula organizaĵo, aŭ de kuracisto, aŭ de delegito de UEA.

**Blindula kaso.** Helpu ebligi al blinduloj la kongresviziton. La komitato antaŭdanke akceptas donacojn por tiu kaso.

**Fakkunsidoj:** Tiuj, kiuj volas aranĝi fakkunsidojn estas petataj sendi informojn al ni kiel eble plej frue, kun indiko pri la supozebla nombro da ĉeestantoj. Ankaŭ tiuj fakoj kiuj jam estas menciitaj en la provizora programo devos skribi al ni tuj. Se ni ne aŭdos ion de ili ni forprenos la kunsidon en la definitiva programo.

**Pasport-vizoj.** De kelkaj landoj oni ne plu bezonas vizon por Svedujo. En aliaj landoj ni provos akiri senpagan vizon por la kongresantoj. Sciigon pri tio vi ricevos poste en via landa gazeto esperantista.

**Kongresa numero.** Sur via kongreskarto vi trovos vian numeron. Ni petas vin skribi ĉiam vian kongresan numeron sur la leteroj, poŝtkartoj kaj kiam vi sendos monon. Tio estas tre grava por ni.

**Nomo kaj adreso.** Skribu vian nomon kaj adreson tre klare kaj legeble. Prefere per literoj similaj al la presitaj. Se vi skribas vian familian nomon antaŭe, metu 2 streketojn sub ĝi.

**Karavanoj:** Tiuj, kiuj intencas aranĝi karavanon al Malmö estas petataj skribi al ni tuj.

**Vojaĝ-prezredukto:** Pro la nuntempaj malfacilaĵoj ni ne povas aranĝi vojaĝ-prezredukton nek en Svedujo nek en aliaj landoj.

**Loĝejo:** En ĉiuj urboj de la tuta mondo mankas loĝejoj (hotelĉambroj ktp) por vizitantoj, kaj en Malmö ne estas escepto. Pro tio estas necese **antaŭmendi** loĝejon, kaj ni devas akcepti **antaŭpagon** por povi rezervi lokon por vi.

— Ĉisube ni indikas diversajn kategoriojn por la hoteloj.

— LKK faros sian plejblon por havigi bonajn hotelĉambrojn por kiel eble plej malaltaj prezoj en la kadro de la indikitaj kategorioj.

— La ĉambroj ĉe privatuloj estas bonaj, kaj ni rekomendas ilin. Se vi volas havi ĉambron kun du litoj, bv. noti tion kaj menciui samtempe kun kiu persono vi volas loĝi.

— En la amasrestejoj la Sveda Ruĝa Kruco disponigos bonajn litojn kun litaĵo kaj litotukoj.

— En la hotelprezoj estas enkalkulita la trinkmono, sed ne la transporto de la pakajo.

Kategorio I.

**Hotelĉambroj.** grupo a. 11 sved. kronoj por unu nokto.  
grupo b. 9 " " " " "  
grupo c. 7 " " " " "

Kategorio II.

Ĉambroj ĉe privatuloj 4 sved. kronoj por unu nokto.

Kategorio III.

Amasrestejo en lernejo 2 sved. kronoj por unu nokto.

Kategorio IV.

**Tendaro.** Tendoj lueblaj por sv. kr. 1.50 por unu nokto. La tendarejo estas senpaga.

**Libertempa intersanĝo de loĝejo.** Ne plu estas esperantisto en Malmö, kiu povos gastigi kongresanon kontraŭ loĝado en lia hejmo poste. Ĉiu jam akceptis iun.

**Mangado:** La nutradon ĉiu kongresano mem prizorgu. Je la dispono estos multaj bonaj restoracioj, inter kiuj la kongresanoj laŭplaĉe povas elekti. LKK donos konsilojn kaj liston en la dokumentaro pri la restoracioj. Vi do mem kunportu svedan monon por la nutrado.

Jen la prezoj. Al tiuj prezoj vi devos pagi 10 % trinkmonon. La malkara mangajo estas bona kaj sufiĉa, se oni ne estas tro postulema.

Matenmangajo ..... sv. kr. 1: 50 ĝis 2: —  
Tagmangajo ..... " " 2: 50 " 5: —  
Vespermangajo ..... " " 2: 50 " 5: —

**Porĉligado.** Nur la mangajo kaj sapo estas porĉiigata en Svedujo. Aliajn aĵojn vi povos aĉeti libere. Ĉe la enveturo en la landon vi ricevos pan-, buter- kaj viandkuponojn por 4 tagoj. Por la ceteraj tagoj LKK aranĝos

por vi poste. La kuponoj validas nur en restoracioj. (Kaf-, te- kaj sukerkuponojn oni ricevas nur post 12-taga restado en Svedujo, sed en la restoracioj oni ne bezonas tiajn kuponojn.)

**Ekskursoj:** Plejparte posttagmezaj.

- E 1 Rondveturo en Malmö, kiam la kongresanoj vizitos diversajn partojn de la urbo kaj rigardos la vidindaĵojn. Tio okazos plejparte dimanĉe posttagmeze .. sv. kr. 3: 50
- E 2 Rondveturo per aŭtobuso al skaniaj kasteloj, norde de Malmö. Vizito de Borgeby, Trolleån, Trolleholm ktp. Lunde posttagmeze ..... sv. kr. 10: —
- E 3 Rondveturo per aŭtobuso al skaniaj kasteloj, sude de Malmö. Vizito ĉe Dalby, Skabersjö, Torup, Svaneholm, Sövdeborg ktp. Marde posttagmeze ..... sv. kr. 10: —
- E 4 **Tuttaga krosado** en la markolo Öresund. Vizito en la belega urbo Hälsingborg. Survoje oni preterpasas la insulon Ven kun i. a. la statuo kaj muzeo de la fama astronomo Tycho Brahe. Merkrede ... sv. kr. 15: —
- E 5 Vizito en la universitata urbo Lund. Lunde, marde, jaŭde kaj vendrede posttagmeze ..... sv. kr. 4: —
- E 6 Banekurso al Falsterbo kun la mondkonata banbordo. Lunde kaj jaŭde posttagmeze ..... sv. kr. 4: —  
Krom tiuj ekskursoj LKK volonte aranĝos aliajn, se estos sufiĉe da intereso viziti specialan lokon. LKK atentigas vin pri tio, ke en Malmö estas bonaj baneblecoj en la sala maro.

**Antaŭkongreso** ne estos aranĝata.

**Postkongresaj aranĝoj:**

- P 1 **Vizito en Stockholm.** La veturo tien — kaj — reen kostas ..... sv. kr. 59: —  
Krom tio vi devas antaŭpagi koston por loĝejo same kiel por la 33-a.  
Restado: 3 tagojn.  
La rapid-vagonaro bezonas 8 horojn de Malmö al Stockholm.
- P 2 **Rondveturo Malmö — Stockholm — Göteborg — Malmö** La fervojbileto kostas ..... sv. kr. 63: —  
Krom tio vi devos antaŭpagi koston por loĝejo same kiel por la 33-a.  
La veturo daŭros 6 tagojn.
- P 3 **Vizito en Laplando.** La fervojbileto al Kiruna kaj reen al Malmö kostas .. sv. kr. 120: —  
La veturo daŭros de Malmö al Kiruna 31 horojn.  
(Al Narvik, en Norvegujo, tien-kaj-reen kostas la fervojbileto ..... sv. kr. 130: —  
La veturo daŭras de Malmö al Narvik 35 horojn.)
- P 4 **Veturo laŭ "Göta Kanal",** la kanalo tra meza Svedujo inter Stockholm kaj Göteborg.  
Fervojbileto de Malmö al Stockholm sv. kr. 29: 50  
Fervojbileto de Göteborg al Malmö sv. kr. 19: —  
La vojaĝprezoj de Stockholm al Göteborg per ŝipo:  
bileto, lito, mangajo kaj trinkmono:  
Kajuto por unu pers. sv. kr. 187: —  
Kajuto dupersona ... sv. kr. 164: — por ĉiu pers.  
Kajuto tri-persona .. sv. kr. 118: — " " "  
La prezoj estas la nunjaraj kaj povos ŝanĝiĝi ĝis la somero 1948.  
La vojaĝo surŝipe daŭras dum 3 tagoj kaj 2 noktoj. La tuta vojaĝo daŭras proksimume 4 tagnoktojn.  
La ŝipo ekveturos de Stockholm dimanĉe la 8/8 je la 9-a horo, alvenos al Göteborg marde 10/8 je la 21-a horo. (Se vi deziras resti en Stockholm dum 2 tagoj, la sekvonta ŝipo ekveturos de Stockholm marde la 10/8 je la 9-a h. kaj alvenos al Göteborg jaŭde la 12/8 je la 21-a h.)

P 5 **Postkongreso en Kopenhago**, la ĉefurbo de Danujo. 7/8—10/8 1948.

Vi petu informojn ĉe postkongresa komitato, adreso: S-ro Gustav Kühlmann, Pr Jörgensgade 4 A, Kopenhago, Danujo. La vojaĝbileto de Malmö al Kopenhago kostas ..... sv. kr. 2: 25

La veturo daŭras 1 horon kaj 45 minutojn. La programo por la postkongresaj veturoj ankoraŭ ne estas tute pretaj, kaj ne estas eble fiksi la definitivajn prezojn por P 3 kaj P 4 antaŭ januaro 1948. Sed vi povas anonci vin, kaj LKK sendos ĉiujn eblajn informojn. La menciitaj prezoj estas la nunjaraj.

Se vi havas intereson veturi al alia loko en Svedujo, LKK volonte aranĝos por unuopaj aŭ por grupoj.

**Somera Universitato.** Ni provos aranĝi Someran Universitaton. Vidu la provizoran programon. Poste aperos pliaj detaloj.

**La kongresa programo.** Ni provos aranĝi teatran kaj literaturan vesperojn. Preskaŭ ĉiutage okazos senkostaj filmprezentadoj kun filmoj pri Svedujo kaj aliaj temoj.

**Skania foiro.** Sabate la 31/7 kaj dimanĉe la 1/8 vi havos la okazon viziti la Skanian foiron. Ni atentigas, ke la Skania foiro, kie ĉiuj grandaj svedaj entreprenoj estas reprezentataj, okazas la semajnon antaŭ la kongreso kaj la du unuajn kongrestagojn. Eble vi povas akiri pli da sveda mono se vi atentigas vian valutan oficejon pri la foiro.

**Oficiala kongresgazeto.** Ĉiu kongresano ricevos la kongresnumerojn de "La Espero" (Svenska Esperanto-Tidningen), la organo de la Sveda Esperanto-Federacio.

**Aliĝoj:** Ĝis la 1-a de novembro 1947 aliĝis 202 personoj el 19 landoj. **Loka Kongresa Komitato**

# PROVIZORA KONGRESPROGRAMO

*de la 33-a Universala Kongreso de Esperanto en Malmö 1948*

**Sabaton, la 31-an de julio.**

- 9.00 Malfermo de la kongresejo.  
Tutan tagon: Vizito ĉe la **Skania Foiro**.
- 15.00 Kunsido de UEA-estraro kaj LKK.
- 19.00 **Solena malfermo** de la kongreso en la urba teatro.

**Programo:**

1. Muziko.
  2. Parolado de la LKK-Prezidanto.
  3. Parolado de reprezentanto de la urba registaro.
  4. Festparolado de la prezidanto de UEA, s-ro E. Malmgren.
  5. Muziko.
  6. Elekto de la kongresprezidanto kaj de la kongreskomitato.
  7. Paroladeto de la kongresprezidanto.
  8. Paroladoj de la reprezentantoj de la diplomataro.
  9. Mallongaj salutoj de la reprezentantoj de la landaj asocioj.
  10. Ĝeneralaj informoj.
  11. Komuna kantado kun muziko: Esperanta himno.
- 21.00 **Interkonatiĝa vespero** en la urba teatro.

**Dimanĉon, la 1-an de aŭgusto.**

- 9 30 **KELI:** Diservo protestanta en la preĝejo de S:ta Petro.
- KATOLIKA LIGO:** Diservo en la katolika preĝejo.
- 13.00 **Fotografado.**  
Rondveturado en la urbo Malmö.
- 16.00 Kunsido de UEA-estraro.  
Tutan tagon: Vizito ĉe la **Skania Foiro**.
- 18.30 Vizito en la amuzejo "La Popola Parko."

**Lundon, la 2-an de aŭgusto.**

- 9 00 **Somera universitato.**
- 10.00 **Unua laborkunsido de UEA.**
- 14.00 Ekskursoj al Lund, (E 5) Falsterbo (E 6) kaj skaniaj kasteloj (E 2).  
**Fakaj kunsidoj.**  
Unua kunveno de Universala Ligo.  
Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio.  
Filmprezentado.
- 15.00 **Kristana Esperantista Ligo Internacia**  
Kunsido de UEA-komitato.

- 16.00 Unua kunveno de Kooperativa Esperantista Ligo.
- 17.00 Lingva komitato.
- 20.00 **Literatura vespero.**

**Mardon, la 3-an de aŭgusto.**

- 9.00 **Somera Universitato.**
- 10.00 **Dua laborkunsido de UEA.**
- 14.00 Ekskursoj al Lund (E 5) kaj skaniaj kasteloj (E 3).  
**Somera Universitato.**
- 15.00 **Fakaj kunsidoj.**  
Internacia Instruista Kunlaboro.
- 16.00 Kunsido de UEA-komitato.  
**ILEPT.**  
Tutmonda Esperantista Jurnalista Asocio.
- 20.00 **Teatra vespero.**

**Merkredon, la 4-an de aŭgusto.**

**Tuttaga krozado** en la markolo Öresund.

**Ĵaŭdon, la 5-an de aŭgusto.**

- 9.00 Filmprezentado.
- 10.00 **Tria laborkunsido de UEA.**
- 14.00 Ekskursoj al Lund (E 5) kaj Falsterbo (E 6).  
**Somera Universitato.**
- 15.00 **Fakaj kunsidoj.**  
Dua kunveno de Universala Ligo.  
Int. Scienca Asocio Esp.-ista.  
Kunsido de UEA-komitato.
- 16.00 Pacifistoj.
- 20.00 **Kongresa balo.**

**Vendredon, la 6-an de aŭgusto.**

- 9.00 **Somera Universitato.**  
**Fakaj kunsidoj.**
- 11.00 Dua kunveno de Kooperativa Esperantista Ligo.  
Kunveno de blinduloj.
- 14.00 Ekskurso al Lund (E 5).  
**Fakaj kunsidoj.**  
Internacia Asocio de Poŝtmark-kolektantoj.
- 15.00 Kunsido de UEA-komitato.  
Bahaismo.
- 19.30 Ev. liberaera aranĝo.

**Sabaton, la 7-an de aŭgusto.**

- 10.00 **Solena fermo** de la kongreso.
- 12.00 **La postkongresaj vojaĝoj** komenciĝos.  
Postkongreso en Kopenhago.

## UNUA LISTO DE KONGRESANOJ

1. S-ro E. Malmgren, Stockholm, Svedujo.
2. D-ro P. Kempeneers, Uccle, Belgujo.
3. Int.-Gen. L. Bastien, Paris, Francujo.
4. S-ro H. Kürsteiner, St. Gallen, Svislando.
5. S-ro C. C. Goldsmith, Rickmansworth, Britujo.
6. S-ro J. Strönne, Malmö, Svedujo.
7. S-ro O. W. Runerheim, Malmö, Svedujo.
8. S-ro Helge Andrén, Malmö, Svedujo.
9. S-ro O. T. Nicolaisen, (norvego), Malmö, Svedujo.
10. S-ino Ester Andrén, Malmö, Svedujo.
11. S-ro Gösta Henriksson, Malmö, Svedujo.
12. S-ro Alve Persson, Malmö, Svedujo.
13. S-ro Harry Nilsson, Malmö, Svedujo.
14. S-ro E. Adamsson, Göteborg, Svedujo.
15. S-ro P. W. Baas, Amsterdam, Nederlando.
16. S-ro J. Baghy, Budapest, Hungarujo.
17. S-ro R. Bugge-Paulsen, Oslo, Norvegujo.
18. D-ro Prof. G. Canuto, Parma, Italujo.
19. S-ro D. Chagnoux, Yzeure s. Allier, Francujo.
20. S-ro G. A. Conner, New York, Usono.
21. S-ro E. Dahl, Uddevalla, Svedujo.
22. D-ro C. Domingues, Rio de Janeiro, Brazilo.
23. S-ro St. Fink-Jensen, Grejsdalen pr Vejle, Danujo.
24. S-ro A. Grigorev, Sofia, Bulgarujo.
25. D-ro St. Ĝuĝev, Sofia, Bulgarujo.
26. S-ro J. Guillaume, Paris, Francujo.
27. S-ro Hans Jakob, Geneve, Svislando.
28. S-ro D. Kennedy, Glasgow, Britujo.
29. S-ro J. Kozlevčar, Ljubljana, Jugoslavujo.
30. S-ro O. Lange, Odense, Danujo.
31. D-ro I. Lapenna, Zagreb, Jugoslavujo.
32. S-ro R. Levin, Lyon, Francujo.
33. S-ro F. Liechti, Rheineck, Svislando.
34. S-ro B. E. Long, Watford, Herts., Britujo.
35. S-ro A. C. Oliver, Rickmansworth, Britujo.
36. S-ro P. Petit, Rosny-sous-Bois (Seine), Francujo.
37. S-ro L. E. Pfahl, Croydon, Aŭstralio.
38. S-ro E. Privat, Neuchâtel, Svislando.
39. S-ro J. Saldanha Carreira, r/c Benfica-Lisboa, Portugalujo.
40. S-ro J. D. Sayers (Usonano), Gissen, Germanujo.
41. S-ro T. Sekelj, Buenos Aires, Argentino.
42. S-ro V. Setälä, Helsinki — Kä, Finnlando.
43. S-ro P. J. Soeters, Zutphen, Nederlando.
44. S-ro J. Stenström, Ulricehamn, Svedujo.
45. S-ro J. Vondroušek, Brno, Ĉeĥoslovakujo.
46. S-ro F. Weeke, Den Haag, Nederlando.
47. S-ro Harry Adler, Malmö, Svedujo.
48. S-ro O. Anderberg, Lund, Svedujo.
49. S-ro Ernst Andersson, Malmö, Svedujo.
50. S-ro Hjalmar Andersson, Malmö, Svedujo.
51. S-ro H. Christoffersson, Malmö, Svedujo.
52. S-ro S. Clausson, Malmö, Svedujo.
53. S-ro R. Demuth, Malmö, Svedujo.
54. S-ro J. Ek, Lund, Svedujo.
55. S-ro E. Fredin, Lomma, Svedujo.
56. S-ro O. Glemminger, Malmö, Svedujo.
57. S-ino Clary Hansson, Malmö, Svedujo.
58. S-ro Hilbert Hansson, Malmö, Svedujo.
59. S-ro Reinhold Hansson, Malmö, Svedujo.
60. S-ro W. Johansson, Malmö, Svedujo.
61. S-ro G. Lidbjer, Lund, Svedujo.
62. S-ro L. Magnusson, Malmö, Svedujo.
63. S-ro Erik Olsson, Arlöv, Svedujo.
64. S-ro Nils Persson, Lund, Svedujo.
65. S-ro Sture Persson, Malmö, Svedujo.
66. S-ro F. Rasmusson, Malmö, Svedujo.
67. F-ino E. Wallin, Malmö, Svedujo.
68. F-ino H. Wallin, Malmö, Svedujo.
69. — 83 Rezervitaj.
84. S-ro P. Nylén, Huddinge, Svedujo.
85. S-ro K. Söderberg, Uppsala, Svedujo.
86. S-ino L. Malmgren, Stockholm, Svedujo.
87. S-ino C. Goldsmith, Rickmansworth, Britujo.
88. S-ino A. G. Strönne, Malmö, Svedujo.
89. S-ro H. Buchli, Bern, Svislando.
90. S-ro T. Julin, Stockholm, Svedujo.
91. S-ino E. Julin, Stockholm, Svedujo.
92. S-ino E. Bugge-Paulsen, Oslo, Norvegujo.
93. S-ro O. Brochmann Sletterød, Ullevål Haveby, Norvegujo.
94. S-ino Aa. Sletterød, Ullevål Haveby, Norvegujo.
95. S-ro C. O. Östling, Trelleborg, Svedujo.
96. S-ino A. M. Östling, Trelleborg, Svedujo.
97. S-ino A. Romand, Barbe (Rhone), Francujo.
98. S-ro G. Kühlmann, København, Danujo.
99. S-ino B. Kühlmann, København, Danujo.
100. S-ro B. Beckman, Lund, Svedujo.
101. S-ino L. Glemminger, Malmö, Svedujo.
102. S-ino S. A. Norlin, Uppsala, Svedujo.
103. S-ino Lillan Nilsson, Malmö, Svedujo.
104. S-ro A. B. Malmkvist, Visby, Svedujo.
105. S-ino K. Malmkvist, Visby, Svedujo.
106. S-ro P. H. Lewis, Didcot, Berks, Britujo.
107. S-ro H. Carrfors, Stockholm, Svedujo.
108. S-ino S. Carrfors, Stockholm, Svedujo.
109. F-ino Agda Olsson, Göteborg, Svedujo.
110. S-ro Nils Olsson, Höör, Svedujo.
111. S-ino Tora Olsson, Höör, Svedujo.
112. S-ro Olle Olsson, Vimmerby, Svedujo.
113. S-ro H. Albinsson, Vimmerby, Svedujo.
114. S-ro C. B. Lundborg, Malmö, Svedujo.
115. S-ino A. Lundborg, Malmö, Svedujo.
116. S-ro S. Nummelin, Ulvsunda, Svedujo.
117. S-ro E. R. T. Bonander, Karlskoga, Svedujo.
118. S-ino G. S. Bonander, Karlskoga, Svedujo.
119. S-ro C. A. Klang, Akarp, Svedujo.
120. S-ino Anna Alamo, Stockholm, Svedujo.
121. S-ro Artur Andersson, Malmö, Svedujo.
122. S-ino Anna Andersson, Malmö, Svedujo.
123. F-ino Lisbet Andrén, Malmö, Svedujo.
124. S-ino Edith Andersson, Malmö, Svedujo.
125. F-ino Anita Andersson, Malmö, Svedujo.
126. S-ino H. Demuth, Malmö, Svedujo.
127. S-ro S. E. S. Eriksson, Uppsala, Svedujo.
128. F-ino Hilda Hansson, Malmö, Svedujo.
129. F-ino Hanna Henriksson, Malmö, Svedujo.
130. S-ino H. Atlas, Malmö, Svedujo.
131. F-ino A. Paulsson, Malmö, Svedujo.
132. S-ro Hjalmar Olsson, Trelleborg, Svedujo.
133. F-ino Maria Persson, Malmö, Svedujo.
134. S-ro S. G. Sjöblom, Malmö, Svedujo.
135. S-ro L. Vasiljef, København, Danujo.
136. S-ino L. Riedle, Zürich, Svislando.
137. S-ro W. Laederach, Zürich, Svislando.
138. F-ino B. M. Chipperfield, Chincf., London, Britujo.
139. S-ro E. G. Marin, Whiteway apud Stroud, Glos., Britujo.
140. S-ro G. W. Roome, Sheffield, Britujo.
141. S-ro J. Korinek, Brno, Ĉeĥoslovakujo.
142. S-ino H. Kornikova, Brno, Ĉeĥoslovakujo.
143. S-ro J. Molnar, Praha-Bubenee, Ĉeĥoslovakujo.
144. S-ino M. Mattyasovszky, Budapest, Hungarujo.
145. S-ro C. Modesto, Forli, Italujo.
146. F-ino K. Waldén, Ystad, Svedujo.
147. S-ro J. Vitek, Hradec Kralove, Ĉeĥoslovakujo.
148. S-ino M. Vitkova, Hradec Kralove, Ĉeĥoslovakujo.
149. S-ro L. S. Lundéll, Malmö, Svedujo.
150. S-ro J. Hammarlind, Rävlanda, Svedujo.
151. S-ro R. Linse, Jönköping, Svedujo.
152. S-ro C. Haugaard, Aabyhøj, Danujo.
153. S-ino J. Haugaard Aabyhøj, Danujo.
154. S-ro S. K. Nielsen, Fredericia, Danujo.
155. S-ino T. Nielsen, Fredericia, Danujo.
156. F-ino V. Nielsen, Fredericia, Danujo.
157. S-ino A. Christoffersson, Malmö, Svedujo.
158. S-ino Karin Olsson, Arlöv, Svedujo.
159. S-ino M. Söderberg, Uppsala, Svedujo.
160. F-ino B. Söderberg, Uppsala, Svedujo.
161. F-ino I. Aronsson, Karlskoga, Svedujo.
162. F-ino C. Bruér, Malmö, Svedujo.
163. F-ino E. Johansson, Malmö, Svedujo.
164. S-ro C. H. Johanson, Linköping, Svedujo.
165. S-ino A. E. Johanson, Linköping, Svedujo.
166. S-ro A. Palmkvist, Malmö, Svedujo.
167. S-ino B. Palmkvist, Malmö, Svedujo.
168. S-ro K. A. Rosengren, Malmö, Svedujo.
169. S-ro B. Zell, Göteborg, Svedujo.
170. S-ro A. De Visser, Dordrecht, Nederlando.
171. S-ino G. De Visser, Dordrecht, Nederlando.
172. F-ino J. Dedieu, Toulouse, Francujo.

La Espero, novembro 1947.

## Baroj

Kiu povos veturi al la universala kongreso en Malmö? Nu, la simpla respondo estas: Tiu, kiu rajtos disponi pri la necesa kvanto da mono. La mondo ja nun estas stranga. Ĉiu lando deziras fortigi sian monon, kaj metas ĉiajn barojn en la vojo por la mona fluo el la lando. Oni ne povas sendi varojn, oni ne povas vojaĝi, oni ne povas sendi monon. Kaj la rezulto iĝas, ke ĉiu lando pli kaj pli malriĉiĝas. La komerco suferas de anemio. La turismo ĉesiĝas. La kulturaj rilatoj mal-ebliĝas. La mondo provas levi sin mem je la haroj.

Ĉu kun tia mondo ni esperantistoj povas esti kontentaj? La respondo estas evidenta. Tia mondo ne estas konforma al internacia movado kia la nia. Kaj tia mondo ankaŭ ne bezonas esperanton. En mondo, kie ĉia strebado celas la sufokigon de la senperaj interrilatoj inter liberaj homoj, esperanto ne havas sencon.

Do, kion ni faru? Unue ni devas provi travivi tiun ĉi periodon de senracieco. Por la kongreso en Malmö ĉiaj klopodoj estas farataj por kontentige solvi la problemojn por la vizitontoj, malgraŭ la baroj limaj. Due ni devas laŭ povo dediĉi nian kromesperantan laboron al forigo de la baroj, al restarigo de la libereco de la individuoj. Tio nuntempe estas la plej necesa por esperanto.

Oso.

## Nia novembra konkurso

Vi havas du precize egalajn glasojn. Unu el ili estas duone plena per vino, la dua duone plena per akvo. Per kulereto vi prenas kuleretplendon da vino el la vina glaso kaj metas en la akvoglason kaj zorge miksas la vinon kaj la akvon. Poste vi el la akvoglaso prenas kuleretplendon de la vinmiksaĵo kaj remetas ĝin en la vinoglason. La demando nun estas: Ĉu vi per la du manipuloj metis pli da vino en la akvoglason, ol akvo en la vinoglason, aŭ inverse, se vi konsideras la finrezulton?

Solvojn, sur aparta papero kun via nomo, antaŭ la 15-a de decembro 1947 sendu al Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, Göteborg V. Libro lotumota.

Nia oktobra konkurso vekis sufiĉe multe da intereso. Unu el niaj solvintoj dediĉis al ĝi multan laboron. Jen lia solvo: Se la tuta sumo estus estinta 1023 kr., la sola solvo estus dispartigo laŭ potencoj de 2, do 1, 2, 4, 8, 16, 32, 64, 128, 256, 512, kaj ĉiu pago estus ebla en nur unu maniero laŭ konata evoluo de la tutaj nombroj laŭ potenco de 2.  $1=1$ ,  $2=2$ ,  $3=2+1$ ,  $4=4$ ,  $5=4+1$ ,  $6=4+2$ ,  $7=4+2+1$ ,  $8=8$ , ktp.

Sed ĉar la sumo estas 1000, ekzistas pluraj solvoj (precize 74), kaj ĉe ĉiu solvo ekzistas 23 pagoj far-eblaj en duobla maniero. Ĉiuj solvoj povas esti esprimataj en la sekvanta formo:

Enhavo de la kovertoj: 1, 2, 4, 8, 16, 32—d, 64—d—c, 128—2d—c—b, 256—4d—2c—b—a kaj  $489+8d+4c+2b+a$ , en kiu la literoj a, b, c, d, reprezentas "gativajn" (nenegativajn) tutajn nombrojn, kiuj krome obeas la rilaton:  $8d+4c+2b+a$  estu malpli ol aŭ egala al 11.

**Pruvo:** Ni ordigu la uzotajn sumandoj (kovertojn) laŭ la granda, komencante per la malplej granda, kiu devas esti 1, ĉar alikaze 1 estus neesprimebla (1 kr. ne pagebla). Por ke ĉiu nombro  $x$  .....ne, nun ni devas fini. Tiu ĉi presejo ne havas la matematikajn signojn por "malpli ol" kaj por "malpli ol aŭ egala al" kaj aliaj tiaj esprimoj. Cetere vi ja tamen bone komprenas, ĉu ne? La pruvo estas multe pli nekomprenebla ol la nura aserto: Kun obligitaj diferencoj, sumoj de diferencoj ktp, estis vere interesa legaĵo! Sed nun ni lotumu!

Ho ve, la multa laboro de tiu solvinto estis vana! La libron gajnis s-ro Knut Reinholdsson, Ö. S. S., Adolfsberg.

## Afiŝa esperantoreklamo en Stockholm



La reportera kamero de s-ro Helmer Almén kaptis tiun bildon de esperanta propagando sur telefona kiosko en Stokholmo.

Vidu la linion tuj super la vizaĝoj!

## Konferenco en Karlstad

La 14-an de septembro okazis konferenco de la Vermlanda-Dal-a distrikto de SLEA kune kun kunlaborantaj kluboj. Rezentantoj de diversaj aliaj organizoj ĉeestis. — Post elektoj sekvis aro da interesaj paroladoj.

S-ro A. Fauhlér faris brilan rakonton pri sia vizito en la kongreso de SAT, kiu okazis en Danujo. Al li plej grandan impreson faris la bonega kaj grandioza kamaradeco inter la 700 partoprenantoj.

La instruisto G. Johansson el Karlstad paroladis pri la temo Esperanto en la nuna mondo. Li kun siaj bonaj scioj kaj spertoj montris al la ĉeestantaj neesperantistoj, ke la disvastiĝo de la esperanto-movado estas vere ampleksa.

La distrikta prezidanto G. Andersson rakontis pri sia ĉeesto je la esperantoinstruista kurso en Brunnsvik, kiun li opiniis esti "meĵloŝtono" en la historio de esperanto, kaj ke la pordoj nun estas malfermitaj en Brunnsvik por esperanto.

Oni diskutis la aŭtunan studlaboron. Pri la metodoj la opinioj estis malsamaj, sed ĉiuj samopiniis, ke la kursoj okazu en la kadro de ABF. Oni decidis, ke la estraro esploru la eblecojn inviti s-inon Anna Alamo fari prelegvojaĝon en la distrikto. S-ro E. Hult admonis la PK sendi iun estraron al lokoj, kie troviĝas dormantaj grupoj, por ilin ree veki.

S-ro G. Johansson rekomendis al la grupoj prunti esperantolibrojn el la Centra Biblioteko de Karlstad, kie troviĝas certa nombro da libroj en esperanto.

La reprezentanto por la Vermlanda Distrikto de Paper-Laborista Asocio, S-ro Berg, Skoghall, salutis la konferencon kaj deziris sukceson al nia movado. Li promesis daŭran monsubtenon de "lia" distrikto. Li krome esprimis kritikon, ĉar li opinias, ke ni ne faras sufiĉan "bruon" por nia agado.

En la konferencejo estis aranĝita ekspozicio de gazetoj kaj libroj de la tuta mondo, kaj tre interesa kaj granda kolekto de korespondataĵoj. **Geĉjo.**



## PRINTEMPO DE MORTO

aperos en decembro ĉe

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Fack 190 71, Stockholm 19

Ĉu vi portadas la verdan stelon?



# NEDERLANDO PROPAGANDAS ESPERANTON

**Gasto de "Jubilea verda semajno" en Zaandam rakontas.**

Kiam la esperantoklubo "Zaandam Antaŭen" (en Zaandam apud Amsterdam, Nederlando) preparis sian 35-jaran jubileon, la estraro celis fari ne nur lokan feston, sed pli grandskalan kaj propagande multe pli efikan. Tial oni decidis inviti eksterlandanojn por vere pruvi al la tuta popolo, kiel efika kaj taŭga estas Esperanto.

La klubestraro organizis diligente kaj grandskale, kolektis monon de firmaoj, membroj kaj simpatuloj (entute ĉirkaŭ 2.000 guldenojn), aranĝis ampleksan programon kaj kun morala apogo de la urba konsilantaro — Zaandam estas urbo je 40.000 enloĝantoj — oni invitis eksterlandajn esperantistojn, kvankam la ekonomia situacio internacia nature ege malhelpas vojaĝojn.

Post jaro de preparado venis la granda tago! La 13-an de Septembro 1947 komenciĝis la "Jubilea verda samajno" en Zaandam. Posttagmeze la nomitan tagon la jubilea klubo povis je la solena akcepto en salono de "De Nieuwe Karseboom" bonvenigi preskaŭ 30 eksterlandajn gekamaradojn el 10 landoj — flanke de granda aro de enlandaj gesamideanoj. La tuta urbo cetere staris sub la radioj de la verda stelo. Sur la Urba Domo kaj Nia Domo flirtis bele la esperantajn flagojn — vespere iluminitaj — en kelkaj montrofenestroj de la lokaj gazetoj kaj librovendejoj estis aranĝitaj ekspozicioj de esperantaĵoj kaj sur la fasado de la renkontejo "De Nieuwe Karseboom" brilis granda esperantostelo ĉirkaŭita de la flagoj de 12 nacioj. Ankaŭ la lokaj gazetoj detale raportis pri la jubilea afero kaj faris intervjuojn.

Dum la solena akcepto parolis la eksterlandaj gastoj, kiuj salutis la klubon kaj substrekis la valoron de Esperanto. Multaj reprezentantoj de lokaj kaj enlandaj organizoj esperantistaj, laboristaj kaj klerigaj laŭdis Esperanton kaj transdonis florojn kaj valorajn memoraĵdonacojn al la jubilanto.

Estis la komenco. La 15-an de Septembro la eksterlandajn gastojn oficiale bonvenigis la Zaandama urbestro je akcepto en la Urba Domo. La urbestro, dro J. In 't Veld, tre favore parolis pri Esperanto — ankaŭ esperantlingve — kiel paca kaj frateca interligilo kaj nome de la urbo li disdonis memoraĵojn al la gastoj. Parto de la paroloj kaj intervjuoj kun kelkaj eksterlandanoj estis pli malfrue dum la semajno disaŭdigita pere de la nederlanda radiostacio Hilversum II kiel kvaronhora programo.

La oficiala akcepto en Zaandam estis la unua sed ne la nura. Ĉe la ekskursoj dum la semajno, la eksterlanda delegacio estis akceptita de la urbestroj en Rotterdam, Edam, Oosthuizen kaj Wieringermeer. La urbestroj afable alparolis la internacian grupon kaj gasteme regalis ĝin per kafo aŭ teo. Flanke de la ekskursoj, dum kiuj la partoprenantoj povis multe vidi kaj lerni de la nederlanda naturo, kulturo, historio kaj ĉiutaga vivo — de la plej modernaj fabrikejoj ĝis vilaĝa idilio kiel famekonata Volendam — la eksterlandaj gastoj ankaŭ partoprenis grandajn kunvenojn en Zaandam, Rotterdam, Oosthuizen, Amsterdam kaj Bergen, kie ili povis paroli kaj konvinkigi la ceestantojn pri la efektiva valoro de Esperanto. Kiel reprezentantoj de Svedujo partoprenis ĉefredaktoro C. Hilmer Johanson, Linköping, kaj redaktoro Einar Adamson, Göteborg, kun edzino, kiuj kelkfoje faris paroladojn kaj donis intervjuojn. La eksterlandanoj povis konstati kaj la laboremon de la nederlandanoj, kaj la disvastigon de esperanto, kiu ĝenerale ŝajnas esti rigardata multe pli gravan aferon ol ekzemple en Svedujo.

Dum la jubilea verda semajno la partoprenintoj bone povis studi la nederlandajn aktualajn problemojn kaj havigi al si impresojn bonajn de la ĉiutaga vivo, ĉar ĉiuj estis gastoj de lokaj samideanoj — kaj gastigitaj en plej grandanima maniero! La semajno, brile organizita, estis vera sukceso. La zaandamaj gesamideanoj povis frape pruvi, ke Esperanto estas vere viva lingvo,



**La fasado de la renkontejo de la Jubilea Verda Semajno en Zaandam estis bele ornamita per verda stelo kaj flagoj.**

kiu povas ludi gravan rolon en la interpopola vivo. La semajno estis grandformata propaganda entrepreno, kiu meritas egan laŭdon — kaj imiton. Certe la gesamideanoj el Anglujo, Francujo, Austrio, Hungarujo, Ĉeĥoslovakujo, Belgujo, Svedujo, Danujo kaj Norvegujo unuanime atestas, ke la Zaandama jubilea semajno estis grava okazintaĵo en la postmilita esperantomondo — okazintaĵo kiu eĥos en vastaj rondoj internaciaj.

**Herjo.**



**PRENUMERATIONSPRIS: ..... 14: 50**

Från 1/10 1947 t. o. m. 31/12 1948

**ANNONS om 25 ord: ..... 2: —**

Avgift insändes till

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO**

Fack 190 71

Stockholm 19

Postgiro 578

# RADIO

## ĈIUTAGE:

17.30—17.45 Praha 25,34 m kaj 1935 m.  
23.00—23.15 Praha 31,41 m.

En ambaŭ la supraj sendoj de Praha raportoj ĉiuspecaj. Ĉiunonate ankaŭ informo pri la esperantista vivo en Ĉeĥoslovakujo. La enhavo de la du sendoj estas malsama. Adreso: Esperantoservo de Radio Praha, Stalinstrato 12, Praha XII.

## LUNDE:

22.50—23.00 Praha I 470 m. Tre varia programo.  
23.30—23.35 Budapest I 550 m. Informoj. — Hungara Radio, VIII. Bródy Sándor u. 7, Budapest, Hungarujo.

## MARDE:

19.50—20.00 Sofia 32,09 m. Informoj el Bulgarujo. — Radio Sofia, Esperantosekcio, Sofia, Bulgarujo.  
22.50—23.00 Ostrava 259 m. Aktualajoj en Ĉeĥoslovakio. Leterkesto. — Esperantoservo de la Radiostacio, Ostrava, Ĉeĥoslovakio.

## MERKREDE:

06.35—06.45 Wien I 506 m. Esperantokurso. — RAVAG-Wien, 30a Argentinierstrasse, Wien IV, Aŭstrio.  
21.10—21.25 Warszawa III 49,06 m. Politikaj informoj. — Esperantosekcio de la Pola Radio, Koszykowa 8, Warszawa, Polujo.  
23.30—23.35 Budapest I 550 m. Vidu sub Lunde.

## ĴAŬDE:

17.50—17.55 Wien II 31 m, 41 m kaj 228 m. Informoservo.  
18.45—18.50 Bern 31,46 kaj 48,66 m. Federalismo kaj paco, paroladetoj de dro Edmond Privat.  
20.45—21.00 Hradec Králové 238 m.  
22.50—23.00 Praha I 470 m. Vidu sub Lunde.  
23.00—23.10 Ostrava 259 m. Vidu sub Marde.

## VENDREDE:

19.50—20.00 Sofia 32,09 m. Vidu sub Marde.  
22.50—23.00 Ostrava 259 m. Vidu sub Marde.  
23.30—23.35 Budapest I 550 m. Vidu sub Lunde.

## DIMANĈE:

06.00, 07.00, 10.00 12.00 Radio-Esperanto (nigra stacio) 2,5 kaj 5 m.

## SPORADE:

1/11 ĉ. 15.00 Hilversum VARA 301 m.  
6/12 ĉ. 16.00 Hilversum VARA 301 m. "Verda Kabareto".

## Mallonge

Deko da malnovaj membroj de Migranta Rondo en Stockholm startis konversacion rondon, kiu kunvenas ĉiun lundon. El MoRo naskiĝis KoRo.

\*

En laboratorio ĉe L. M. Ericsson s-ro Alexandersson nun gvidas esperantokurson por 6 komencantoj. Oni studas duonan horon dufoje en la semajno tuj antaŭ la komenco de la laboro.

### Infankursoj en Moskvo.

Laŭdire oni nun aranĝas infankursojn en esperanto en Moskvo.

### Rumana legacio dankas.

La legacio de Rumanujo en letero al s-ro Ernfrid Malmgren esprimas sian koran dankon pro la helpendoj de la esperantistoj al la rumana popolo. La legacio petas pri transdonado de la danko al ĉiuj donacintoj.

## SLUT HOS FÖRLAGET!

Följande artiklar är utgångna. I de fall nybeställningar kommer att ske annonseras detta i tidningen.

Nr. 102 Systematisk kurs i Esperanto.

Nr. 117 Esperanto-grammatik.

Nr. 208 La Fino hft. 1. uppl. (Nr. 210 — Folkuppl. Kr. 2: 75 finnes dock ännu).

Nr. 404 och 405 SEF:s propagandamärken.

Nr. 452 och 455 Vykort Göteborg och Lappland.

Nr. 468 Kallelsekort.

Nr. 474 Kuvert.

## — ESPERANTOMÄRKEN —

Av i katalog A upptagna esperanto-märken finnas numera endast följande (de med \* levereras endast så länge ineliggande lager räcker):



Nr. 423 A\* = Berlock ..... 1: 25



Nr. 424 A\* = Nål (endast en del äldre märken — något mörknade i metallerna — kvarstå och utförsäljas till ..... 0: 50



Nr. 425 \* = Knapp ..... 0: 90



Nr. 428 = Knapp ..... 1: —

Nr. 430 \* = Nål ..... 0: 50

Miniatyrstjärna på vit botten } Nr. 435 \* = Knapp ..... 0: 75

## NYHETER



-märken ..... 1: 25

Nr. 431 = nål Nr. 432 = knapp Nr. 433 = brosch

Nr. 491 NYTT Bords-standar i vitt siden 13: —

Nr. 458 NYTT Zamenhof-porträtt i storlek 290×390 mm ..... 1: —



Nr. 406 NYTT brevmärke, gummerat. Påse med 75 st. 0: 50

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fack 190 71 Stockholm 19 Postgiro 578

## Korespondu

Deziras korespondi.

17-jara studanto pri elektrotekniko, speciale radio-tekniko: Eugeninsz Klima, Tomasiow-Mas, UI, Kramarska 7, Polio.

Stockholma grupo de Kristana Esperanta Ligo Internacia havas letervesperon la 22-an de nov. kaj esperas ricevi multajn leterojn. Sendu al s-ro Wilhelm Dahlén, Solgatan 21, Spånga, Svedujo.

Prisciencaj artikoloj.

Franca samideano skribis al la gazeto, petante artikolojn por franca revuo. La artikoloj pritraktu la kondiĉojn por la sveda scienco nuntempa ktp. Interesiĝantoj sin bv turni al s-ro Johano Faroux, Ecole Normale, 10 Rue Molitor, Paris XVI, Francujo.

Deziras aĉeti.

Internacian elektroteknikan vortaron, IEC 1938: Alexandersson, Ulricehamnsvägen 16, Hammarbyhöjden, Svedio.

## Teknika sekcio de SEF

Komuniko 1.

Tri inĝenieroj en Stockholm interkonsentis organizi teknikan sekcion de Sveda Esperanto-Federacio. Ii nun funkcias kiel prepara komitato: Rudolf Pehrsson (presidanto), Karl Wästfelt, Sven Alexandersson (sekretario).

La adreso estas: Teknika sekcio de SEF, Alexandersson, Ulricehamnsvägen 16, Hammarbyhöjden. Telefono: Stockholm 48 74 69. Poŝtkonto: 19 09 76.

La programo de la sekcio estas:

1. Krei teknikan literaturon kaj teknikajn terminarojn en esperanto.
2. Akceli la enkondukon de esperanto en teknikajn kaj sciencajn rondojn.
3. Kunigi tiujn esperantistojn en Svedujo, kiuj havas intereson por tekniko kaj scienco.
4. Kunlabori kun samcelaj organizoj en eksterlando.

Aliĝoj al la sekcio estas akceptataj jam nun. Poŝtkarto sufiĉas.

Skribu nomon, adreson, eventualan titolon, profesion, laborejon.

Vian fakon kiom eble detale difinu, kaj se vi havas specialan teknikan intereson ekster la profesio, menciuj ankaŭ tion. Tio povas esti valora por la sekcia laboro. Ĝis plue ne estas fiksita speciala kotizo.

Salex

## Svenska Esperanto-Tidningen

La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Ansvarig utgivare: W. Wahlund

Redaktör: Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, Göteborg V. Tel. 29 03 81.

Prenumerationspris. Helt år (12 nr) kr. 4:— . Lösnummer: 0:40. Eksterlanda abono kr. 4:50 aŭ 15 int. respondkuponoj.

Annonspris: 0:20 pr mm. Korrespondensannons: 1:50 (aŭ 5 int. respondkuponoj).

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto (se nedan).

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a. Postadress: Fack 19071, Stockholm 19. Expedition: Sveavägen 98, VI. (Kl. 19—21.) Telefon: 31 65 01 (förlagschef 50 88 05). Postgiro: 578. (Böcker, tidningar m. m.)

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgifter: Direkt ansluten medlem erlägger 7:50 kr. pr år och erhåller tidningen gratis. Familjemedlem, som ej erhåller tidning, erlägger 4:— kr. pr år. Förening med kollektiv prenumeration å tidningen för sina medlemmar erlägger för varje medlem en årlig avgift av 5:— kr. För familjemedlem är årsavgiften 2:— kr. Förening, som ej prenumererar kollektivt å tidningen, erlägger för varje medlem 2:— kr. pr år. Varje ansluten förening erhåller ett exemplar av tidningen gratis.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO. Cefdelegito redaktoro Einar Adamsson, Värmlandsgatan 18, Göteborg. Tel. 14 58 40, poŝtgira konto 443 81. Kotizoj: MJ 4:— kr., MA 10:— kr., MS 20:— kr., kaj Patrono 100 kr.

Instruon pri Intersteno ("Internacia stenografio") donas Bengt Joelsson, Köping, kontraŭ sendo de 70 oeroj poŝtmarke. Al eksterlando kontraŭ 3 respondkuponoj.

**Manuskriptoj por numero 12 atingu la redaktoron plej laste je la 15. 11. 1947**

# YTONG

La malvarma norda klimato necesigas varmizolajn ekstermurojn. Ordinara konstrumaterialo tial estis ligno, speciale en kamparo kaj urbetoj. La lignaj konstruaĵoj tamen kaŭzis multajn brulakcidentojn.

Dank al la sveda invento "Ytong" oni nun je modera kosto povas konstrui brulreziste sed varme en malvarma klimato. Ytong estas poroza betono, tiel malpeza ke ĝi povas naĝi sur akvo, sed tamen fortika.

Svedlingva broŝuro havebla senkoste.

**YXHULTS STENHUGGERI A.B.**  
**Hällabrottet**

# JULKLAPPAR ★ HEDERSGÅVOR

## ★ BRÖLLOPPSPRESENTER ★

— och så en bok åt Er själv på **BOKENS DAG** den 15 dec.

### Antologier

Sveda ..... hft. 8: 50 inb. 10:—  
 Belga ..... 2 del. hft. 9:—  
 Ĉeĥoslovaka ..... hft. 9:— inb. 11:—  
 Hungara ..... hft. 9:— inb. 11:—  
 Svisa ..... inb. 18: 50

### Grammofonskivor med Esperanto-sånger

La Espero — La Tagiĝo  
 Kristalo la bela — Ni marŝas tra l'arbar'  
 Valso pri majo — Zillervalo

Pris per sats Kr. 6:75

**PLENA VORTARO** Kr. 15:—  
 512 sidor. Grönt klotband

**ENCIKLOPEDIO I-II** Kr. 30:—  
 Grått klotband

### Modern Rakhyvel

+ 5 pkt RAKBLAD ESPERANTO TUTMONDA

Kr. 6:—

### GOSTA BERLING

Selma Lagerlöf

Vinrött klotband

Kr. 7:50

### GÄSTBOK

Förnämligt finskt hantverk.  
 Rygg och kanter av grön moccaklot.  
 Pärm av brunbetsat björkfanér. 200 sidor.

Kr. 9:—

**5 Band ur STELO-LIBRO-serien tillsammans Kr. 25:—**

BERNADOTTE: La Fino  
 SZILAGYI: La granda Aventuro  
 FLOOD: Mi Serĉis Oron  
 ENGHOLM: Vivo Vokas  
 ZILAHY: Printempo De Morto

Ett fåtal ex. återstår av

**50 JAROJN KUN PAUL NYLÉN**

i den numrerade bibliofilupplagan

Kr. 12:—


**LA SANKTA BIBLIO** Kr. 8:—

**LA VIVO DE NIA  
 SINJORO JESUO** Kr. 6:75

**LA LIBRO DE LA SPIRITOJ** Kr. 12:—

### BORDS- STANDAR

Högklassigt utförande i vitt siden med guldsnodd och -tofsar.  
 Storlek 16×24 cm.



Kr. 13:—

Vid förskottsbetalning för order under 10:— kr. tillkommer 10 % för porto.

**FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO**

Fack 19071

Stockholm 19

Postgiro 578

